

Ирина Саверьевна Алексеева ,
 Ode a Samarcanda
tradukita de Carlo Minnaja

Argiope-informo:
 La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
 Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Ирина Саверьевна Алексеева ,
 Odo al Samarkando
tradukita de Manfred Retzlaff

laŭvorta Esperantigo de la germanigo

Mi kantas al vi, ho Samarkand'
 Tiun ĉi kanton. Vi restis tiel juna.
 Vi estas konata en la tuta mondo.
 Kiu vin vidis, tiuj devas vin ami.

Profeto vin iam antaŭvidis
 En sonĝo antaŭ longa, longa tempo,
 Kaj Temerlan' vin konstruis
 En via tuta majesteco.

Kaj viaj sanktaj haloj, trezorejo
 De l' arto kaj de l' instruo,
 Jarcentojn ili jam staras tie,
 Kvazaŭ apenaŭ pasis tempo.

Tie ĉi la poeto Navoi
 Estas kantinta pri amo kaj forto,
 Kaj liaj kantoj ankoraŭ neniam
 En tiu lando tute estas forsonintaj.

La kupoloj de la minaretoj tie ĉi,
 Ili lumas tage kiel nokte la steloj.
 Per la dekoro de iliaj ornamoj
 Ili salutas ĉiun jam de fore.

...

Ирина Саверьевна Алексеева ,
 Odo al Samarkando
tradukita de Vladimir Masalkin

Mi kantas vin, ho, Samarkand'
 Kaj laŭdas mi aspekton sunan!
 Kaj vian koron — Registan' —
 Mi ĉiam pretas nomi juna.

Korbaton ĝian sub stelar'
 Eksentis Ulughbek junece.
 Kaj daŭras de Timur centjar'
 Kaj pli ĝi longas majestece!

Madrasoj sanktaj estas nun
 La ejoj por la art' kaj sentoj.
 Kaj de beleco ilia sun'
 Centjarojn igis la momentoj.

La poezi' de Navoi,
 Je amo kaj je forto riĉa,
 Tre helpis al popol' de vi
 Fiera resti kaj feliĉa.

De minaretoj kupolar'
 Similas al stelar' ĉiela,
 Beleco de la ornamar',
 Lazuro pura kaj tre hela.

...

Ho Samarkand, urbo de l' saĝeco!
 Tie ĉi staras preĝejoj kaj moskeoj,
 Kai tiu, kiu vin konas, tiu diras,
 Ke en la mondo li vidis nenion pli belan.

En saĝa urbo de l'anim'
 Moske' najbaras kun preĝejoj.
 Por homoj, kiuj amas vin,
 Vi estas bela rifuĝejo!

Ho Samarkand, floru kaj prosperu!
 Via gloro disfamiĝu ĉie,
 Kaj eterne nepereema estu!
 Ankaŭ estonte nin akompanu!

Ho, Samarkand', disfloru pli
 Kaj gloru vin bonagoj fame!
 Kaj flugu al eterno vi,
 Restante apud ni ĉiame.

*Traduko de la Rusa poeto "Ода Самарканду" de Ирина Саверьевна Алексеева en itala de CARLO MINNAJA (*1940-03-19).*

*Traduko de la Rusa poeto "Ода Самарканду" de Ирина Саверьевна Алексеева en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-03-25.*

Traduko de la Rusa poeto "Ода Самарканду" de Ирина Саверьевна Алексеева en Esperanton de Vladimir Masalkin.

Arg-860-2206 (2014-11-13 12:31:20)

Arg-860-1736 (2013-03-26 17:48:13)

Arg-860-1734 (2013-03-24 15:52:41)

Tiu ĉi poem-italigo aperis en 2013 en la libro "Ода Самарканду". Ода Самарканду: пер. на 62 языка / И. С. Алексеева ; ред.-сост.: А. Ионесов . - Москва. : Изд-во журн. "Юность", 2013 . - 91 с. : ил., 2 л. ил. Pri la tradukinto vidu la retejon http://it.wikipedia.org/wiki/Carlo_Minnaja.